

THE NORTH AMERICAN

Esperanto Review



**CHICAGO
VOKAS
NIN**

6 - 7 - 8 Julio

**La "Netuŝebla"
Fundamento
De Esperanto**

Julio—Aŭgusto 1962

The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 10, No.4

808 Stewart St., Meadville, Pa.

DONALD BROADRIBB, Editor

Published by the Esperanto League for North America, Inc., as its official organ, and founded in 1953. The Esperanto League is a participating organization in the People-to-People Program (John F. Kennedy, Honorary Chairman; Dwight D. Eisenhower, Chairman, Board of Trustees)

Subscription Rates: \$2.00, regular; \$1.75 gift subscription (three for \$4.00). **Membership Rates:** \$5.00, regular; \$10.00, supporting member; \$20.00, patron member; \$100.00, life member; \$7.00, man and wife. Checks and money orders should be payable to the Esperanto League for North America, Inc. Send all payments, subscription and membership orders to the treasurer, Jay Berry, 3231 N.W. 62nd St., Seattle 7, Washington.

Officers of the Esperanto League for North America, Inc.: President, David B. Richardson, R.F.D. Box 81, Eastsound, Washington; Vice-President, Charles E. Peterson, 8314 E. Florence, Downey, California; Secretary, Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania; Treasurer, Jay Berry, 3231 N.W. 62nd St., Seattle 7, Washington. **Executive Board:** Armin F. Doneis, Sr., P.O. Box 105, Pharr, Texas; Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland; Mary Gibson, P.O. Box 409, Riversdale, Fresno County, California; Frans J. Jahger, 2736 Locust Dr., Bridgeville, Pennsylvania; Dr. James Lieberman, 24 Clafin Rd., Brookline 46, Massachusetts; Paul Nace, 1410 Ray Road, Hyattsville, Maryland; Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, California; H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington; Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California.

Material for inclusion in the September issue of the **Review** must be sent no later than the first day of August.

INTERNATIONAL CONFERENCE OF SCIENTISTS

The language problem in science is to be the subject of a special conference of scientists held in conjunction with the 47th Universal Esperanto Convention in Copenhagen, Denmark, August 5-11 of this year.

There is no need to point out the importance of this conference. The language problem in science is especially troublesome. The diversity of languages wastes time and energy, leaves in obscurity valuable scientific works published in relatively minor languages, makes direct exchange of thought in international scientific conferences impossible, and creates confusion instead of clarity—a situation catastrophically opposed to the spirit of science.

In Copenhagen serious study of this problem will be undertaken. All scientists who can, and will, contribute seriously to the work of the conference are invited to take part. Concisely, the arrangements are these:

The conference will be, as mentioned, open to all scientists who can contribute to the work being undertaken. Working sessions of the conference will be, as is customary at scientific working conferences, closed to non-scientists and non-technicians. However, specially interested non-technicians may, upon advance request, receive permission to attend as observers.

The conference is to consist of two parts, in collaboration with the Universal Esperanto Association. The first part will consist of the lectures in the yearly International Summer University series, which this year will be directed to concerns of the conference. They will treat the language problem in science from the viewpoint of the various scientific divisions, without treating such general items as are already well known (e.g., common language difficulties at international conferences), but concentrat-

ing on specific language problems in the individual pure and applied sciences. All of the lectures will be available in mimeographed form in order to serve as the basis of discussion in the working sessions of the conference.

Another part of the material to be studied will consist of contributions prepared before the conference by scientists. These too will be available in mimeographed form.

All of the material thus collected will be discussed in the working session of the conference. Lectures in the International Summer University series will be given before Thursday of the conference week, while the first sessions of the conference proper will take place on Thursday, part of Friday, and Saturday afternoon.

Members of the conference are not required to pay fees. Mimeographed materials will be distributed without charge. All scientists interested in the subject are entitled to contribute material for study and to take part in the conference. Translation services into Esperanto will be provided where necessary.

The tentative program of the conference includes the following items (items marked ISU are in the International Summer University series, and will be given before the first working session):

Part One: General Topics

A consideration of language efficiency, by Vilho Setälä (Finland).

Elaboration of Esperanto lexicology (ISU), by Prof. G. Waringhien (France).

An attempt to formulate the essential laws of mechanics in Esperanto (ISU), by Nowak Zbigniew (Poland).

The interest of small nations in a common language for science,

by Prof. Paavo Ravila (Finland).

Problems of international language in regard to mechanical translation, by Kjell Stellan, M.A. (Denmark).

Part Two: Specialized Topics

The value of Esperanto for the international evolution of medicine (ISU), by Prof. H. Yagi (Japan).

Work and experiences of the Medical Terminological Center, by Dr. A. Albault (France).

The language problem in international relations and international law, by Prof. Ivo Lapenna (England).

The language problem in the field of patents, by Dr. W. P. Roelofs (Netherlands).

Problems of linguistic unity in the biological and agricultural sciences (ISU), by Dr. Paul Neergaard (Denmark).

How should organisms be named? (ISU), by C. Stop-Bowitz, M.A. (Norway).

What steps must be taken to introduce Esperanto into international conferences and conventions, by Dr. W. Hollnagel (Germany).

The pronunciation of letters in Esperanto, with particular reference to chemical formulas, by Dr. W. J. Nijveld (Netherlands).

A preliminary list of participants in the conference includes scientists from England, Yugoslavia, Denmark, France, Norway, Poland, Finland, Netherlands, and Germany, with observers from these countries as well as Sweden, Japan, and the United States.

BOOKS ABOUT ESPERANTO

BOOKS IN ESPERANTO

Esperanto League Book Service
Middleton,
Wisconsin

INTERESTING STATISTICS

Statistics about Esperanto are often difficult to find. For general interest, and for use in informational activities, we present some figures about the Esperanto movement:

Last year approximately 10,000 persons attended conferences at which Esperanto was the official language.

Esperanto is currently taught in approximately 540 schools in 27 countries. In England 733 children attend Esperanto classes in 14 schools. One English teachers' college also includes Esperanto. In the United States, 5 elementary schools in California include Esperanto lessons in their curricula.

15 Radio stations in Poland (2), Brazil (2), Bulgaria, Spain (2), Switzerland, Netherlands, Austria, Italy, Guatemala, France, Czechoslovakia, and Yugoslavia are currently broadcasting in Esperanto. Programs are broadcast daily on shortwave by Radio Warsaw (Poland), and at various times during the week by the rest. A total of five hours and fifty-five minutes of regularly scheduled broadcasts occur each week, from the 15 stations.

The Universal Esperanto Association (which incorporates 27 national Esperanto Societies) had a total of 30,531 members at the close of 1961, of whom 23,263 were associate members (i.e., members of the national societies) and 7,268 were individual members not included in the reports of the national societies. This compares with 16,185 members in 1952 (ten years ago), of which 10,447 were associate members. The 1961 U.E.A. Yearbook listed 3,049 local consuls in 63 countries. The U.E.A. book service, in the same volume, listed just over 500 titles currently available in Esperanto.

60 periodicals are currently published entirely in Esperanto, and approximately 30 others are published for informational purposes in Esperanto and one or more national languages. One (Heroldo de Esperanto)

is semi-monthly, one (Geografia Revuo) is yearly.

The number of **speakers** of Esperanto is difficult to determine. An attempt at a census, published in June, 1952, indicated a total of 42,002 organized Esperantists, and 280,079 persons capable of reading Esperanto and, on occasion, speaking it. Conjectures for certain countries which for political reasons could not at the time be included in the census brought the total to approximately 380,000 persons capable of reading (and, to an extent, speaking) Esperanto. This compares with 126,576 in a census taken in 1926. Allowing for the recent spurt of growth in several areas in the past few years, it is conjectured that at present approximately 700,000 persons now fall under the definition of Esperantist (persons able to read and speak Esperanto).

Esperanto or Zamenhof Streets are popular means of honoring the international language. 24 countries, with 221 cities, have named 239 streets in honor of Esperanto or its inventor, Dr. L. L. Zamenhof. The first Zamenhof streets were inaugurated in Sabadell, Spain, in 1912; and in Tarasa, Spain, in 1912. France has the most streets, with 42 cities having honored the language.

Postage Stamps and Esperanto have been brought into juxtaposition 25 times, by 8 countries. The first was issued in Russia in 1925, the latest

★ ★ ★

ABOUT SPECIAL RATES FOR CLUBS

Has your local club looked into the special rates available for ELNA memberships? Refer to the January-February, 1962, Review for information on how your club can help promote Esperanto and at the same time save money for its members or for the club's own treasury.

★ ★ ★
★ ★ ★

was issued this year by Czechoslovakia. Of these stamps, 7 were issued in honor of Zamenhof, and 5 contained text printed in Esperanto but commemorating some non-Esperantist event.

International Esperanto Conventions (the Universalaj Kongresoj de Esperanto) open to all Esperantists have been held 45 times, and have been planned 47 times. One, in 1914, was cancelled at the last moment because of the outbreak of the war; the other, no. 47, is to be held in August of this year, in Copenhagen, Denmark. The first such meeting, in 1905, drew 688 participants (not all of whom actually attended). The largest actually held drew 4,963 participants (in 1923). The second largest, 3,400 (in 1924). The third largest, 3,256 (in 1959). Average participation in the conventions has been: in the period 1905-1914: 1,174; in the period 1915-1930: 1,598; in the period 1931-1939: 1,258; in the post-war period 1947-1960: 1,951. Two such international meetings have been held in America: in 1910, in Washington, D.C.; and in 1915, in San Francisco. The Washington meeting drew 357 persons, the San Francisco meeting 163.

The **largest** national Esperanto society in the world is in Yugoslavia, having over 3,500 members. 6 national societies have over 2,000 members. The smallest group affiliated with the U.E.A. is the Australian association, with about 150 members.

★ ★ ★

ESPERANTO EXAMINATIONS

The **United States Society of Esperantist Teachers**, in cooperation with **ELNA**, is putting the finishing touches on a system of examinations suitable for beginning and advanced students of Esperanto. Students who pass the examinations will be awarded certificates of proficiency. The examinations will be introduced during the Convention of **ELNA** in Chicago, and will be administered by mail thereafter.


BRITISH AND AMERICAN ESPERANTISTS

HOLD REUNION IN RIO GRANDE VALLEY

Mr. Wm. Simpkins, formerly at home in Stourbridge, England, now at home anywhere in the world, enjoyed renewal of a friendship with the Doneis Family in Pharr, Texas, at the Mexican border. This friendship began when they met in Copenhagen, Denmark, during the Esperanto Convention in 1956. Both Simpkins and the Doneises had already in 1956 gotten reputations of being footloose and fancy-free thru their extensive travels and were envied for their freedom to make close friends all along the way. They were not hindered by the language barrier. Their use of the international language, Esperanto, made these many pleasant contacts possible.

During his visit with the Doneises in South Texas, Simpkins compared travel notes and agreed that truly "Esperanto is the Passport to World Friendship" and reminisced about mutual friends in many countries. The erroneous claim often heard that "English is spoken everywhere" Simpkins branded as a "fairy-tale" and he complained that the usefulness of the English language to the traveler abroad is highly overrated. For the traveler who wants to get off the beaten tourist paths and "meet the natives" on a basis of linguistic equality he highly recommends Esperanto.

Simpkins spoke before numerous interested audiences in the Rio Grande Valley of Texas, telling of his experiences during the past eleven years when he traveled some 100,000 miles in 40-odd countries on four continents, and told of his advantageous use of Esperanto in friendly personal contacts. He contrasted the use of the neutral international language which is acceptable everywhere and his native English which suffers from commercialism abroad and is tainted with linguistic imperialism. He stressed how welcome a British or American Esperantist traveler is made to feel abroad because he does-



W. M. Simpkins and Armin Doneis

n't expect everybody to cater to his national pride. Nobody needs to stoop to stammering in English. "It's only sporting to speak the neutral language that all the world can learn easily!" says this Britisher.

In the most unexpected places and circumstances Simpkins has met Esperantists, identifying them by their international symbol, the green star; but ordinarily he uses the directory of the Universal Esperanto Association to make dependable contacts with key Esperantists in each city. He recently spent six months wandering thru Mexico and is wending his leisurely way north to a Canadian Esperanto Convention in Hamilton, Ontario, and later will attend the 10th Annual Convention of the Esperanto League for North America in Chicago early in July. Then he plans a pleasure cruise all the way around South America by ship, stopping in many ports to make new friends along the way. In 1965 he will make his third trip to Japan to revisit his many Japanese Esperanto-speaking friends during the 50th Universal Esperanto Convention in Tokyo.

PRI LA “FUNDAMENTO DE ESPERANTO”

Se hodiaŭ la lingvo Esperanto ĝuas certan vivantecon kaj daŭran disfloradon tra la mondo, tiu fakto ŝuldiĝas grandparte al malgranda (ĝuste cent-paĝa) libro kun la supra titolo. Tiu libreto, verkita de D-ro Zamenhof en 1905, konsistas el speciale verkita antaŭparolo, kaj represo de tri antaŭaj verkoj: la 16-regula gramatiko, la ekzercaro, kaj la universala vortaro de Esperanto.

D-ro Zamenhof plene konsciis la danĝeron al “artefarita” lingvo kiu estas la nocio, ke kion la homo kreis, la homo povas ankaŭ plibonigi. Kvankam tia nocio validas ĉe maŝinoj, eble, eĉ ĉe arto aŭ sociaj ideoj, ĝi povus esti ruiniga por lingvo. Ŝajnas la plej komprenebla afero en la mondo ke, elstudinte kaj ekposedinte lingvon, ties adeptoj ne kun ĝojo konstato la neceson ĝin relerni, du-, tri-, aŭ plifoj, kiam ajn iuj “ekspertoj” decidas enkonduki ŝanĝojn. Sed ĝuste tia senfina ŝanĝado, en la nomo de “plibonigoj”, kaŭzis jam la disrompon de pli ol unu projekto pri internacia lingvo, kaj tian disrompon Zamenhof saĝe volis eviti por certigi al Esperanto kontinuecon kaj vivon.

Tial li kunmetis en 1905 la Fundamenton, el kies antaŭparolo mi ĉerpas kelkajn citaĵojn:

“Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj,— estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla **Fundamento** de la lingvo . . . **Neniu** **persono** kaj **neniu** **societo** **devas** **havi** **la** **rajton** **arbitre** **fari** **en** **nia** **Fundamento** **iun** **eĉ** **plej** **malgrandan** **ŝanĝon!** . . . Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidas alie, ĉio, kio troviĝas

en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; . . . ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k.t.p., estas nur verkoj **privataj**, kiujn la esperantistoj—se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero — povas rigardadi kiel **modela**, sed ne kiel **deviga**.

“La ‘Fundamento de Esperanto’ devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta gvida dokumento, . . . kiel konstanta **kontrolo**, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco.”

Se la Fundamento fakte **ne** troviĝas hodiaŭ “en la manoj de ĉiu bona esperantisto”, tion kaŭzas la interesa fakto, ke la libro fariĝis kopirajta posedaĵo de la kompanio kiu eldonis ĝin, ke ĝi estas elĉerpita kaj post la dua mondmilito ne represiiĝis.

Sed tio neniel tuŝas la devigan aŭtoritaton de la libro — aŭtoritaton super tiun de la verkantoj de lernolibroj kaj vortaroj, de la Akademio, de la redaktoroj de gazetoj, kaj de ĉiu alia kvazaŭa aŭtoritato, inkluzive la ceterajn verkojn de Zamenhof mem.

Tiun aŭtoritaton ankaŭ firmigis la Unua Kongreso de Esperanto ĉe Boulogne-sur-Mer en 1905, kiu ĝin akceptis kaj oficialigis kiel **deviga** kaj **netuŝebla**.

Ke la nuntempaj Esperantistoj ĝenerale ne atentis — eĉ tro ofte ne konas — la enhavon de tiu gravega verko pravas la daŭra polemikado pri pluraj lingvaj demandoj. Konsideru ekzemple la furioziĝon lastatempe de la afero “ata-ita”. Tiu stranga tepota tempesto turniĝas ĉirkaŭ la fakto, ke en Esperanto ni havas, ne unu formon de la pasiva participo, kiel en multaj aliaj lingvoj, sed tri formojn, esprimantajn agojn estintajn, estantajn, estontajn. Kiun formon, do, uzi en frazo, kiel: **The book was written in 1960.** Ĉu “estis

verkita" aŭ "estis verkata"?

Nu, kvankam ni volas esprimi simplan fakton — nome, ke la verkado de la libro okazis en certa tempo — la uzo de tempesprima participo plus formo de la verbo "esti" konsistigas, vole-nevole, kompleksan verboformon. Jen la kerno de la problemo. La "atistoj" insistas, ke ni ne rajtas diri "estis verkita" ĉar tio komprenigus, ke la libro estis jam en ekzisto antaŭ 1960. Dum la "itistoj" protestas, ke "estis verkata" signifus, ke ĝia aŭtoro estis verkanta la libron en 1960, do ankoraŭ ne finis ĝin en 1960, sed iam poste.

Sed kion diras la Fundamento? Sub la regulo 6a (paĝo 6a en la eldono, kiun mi havas) ni legas: "La pasiva voĉo formiĝas per la verbo est kaj la participo nuntempa aŭ pasinttempa de la koncerna verbo." (Mia substreko.) La regulo do evidentiĝas, ke en iuj okazoj oni uzu unu formon kaj en aliaj okazoj la alian, sed ĝi ne distingas precize inter la du specoj de okazoj.

La Fundamento tamen ne konsistas nur el la gramatika parto, sed ankaŭ el la 42 "ekzercoj," t.e., modelaj formoj, kaj en §12, ni legas: "Georgo Vaŝington estis naskita la dudekduan de Februaro de la jaro mil-

sepcent-tridek-dua". En §25 aperas: "Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita". Kaj en §33: "La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis". En §35: "La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj . . .". Kaj fine, en §39: "Mia onklo . . . estis mortigita de neniu . . .".

Per la supraj ekzemploj ni povas nur konkludi, ke la Fundamento apogas la pretendojn de la "itistoj" ĉar en ĉiu okazo la formo ita aperas post la verbo estis por indiki simplan pasivon. En la du okazoj, kie temas pri kompleksa antaŭtempoco—alivorte pluskamperfekta verbajo—tio estas indikita per la kunteksto: jam longe konstruita kaj longe estis nefermita. Kaj sekve, agnoskinte la aŭtoritaton de la Fundamento kaj volante eviti "deflankiĝadon" de ĝi, ni povas tute trankvile starigi al ni kelkajn fidiindajn modelajn frazojn:

La libro estis verkata en 1960, the book was being written in 1960.

La libro estis verkita en 1960, the book was written in 1960.

La libro estis jam verkita en 1960, the book had been written in 1960.

Sed mia celo ĉi tie ne estas daŭrigi la polemikadon pri ata-ita (cetere la afero estas ridinde sensignifa, ĉar ĝi temas sole nur pri ĝuste tiuj frazoj, kie ambaŭ formoj estas uzublaj sen risko de serioza miskompreno). Mi nur volas ilustrati la konfuzon, kiun povas kaŭzi la bedaŭrinda malatento al la Fundamento, fare de tiel multaj hodiaŭaj Esperantistoj.

Aliaj ekzemploj povus servi egale bone. Iuj Esperantaj revuoj lastatempe ektuŝis la demandon pri Esperanta skribmaniero. Oni plendas, ke la korespondado inter malsamlandanoj suferas pro tio, ke diverslande oni skribas la literojn diversmaniere, ĉu ne indus interkonsenti pri unu komuna skribmaniero?

Jen bona ideo, sed tre videble la proponintoj ne havas en la manoj la Fundamenton, alie ili turnus sin al la paĝo 11a kaj tie vidus:

Ho Mia Glora Sinjoro,
helpu ke mi fortenu min de ĉiu
senregula inklino;
por subpremi ĉiun rebelan pasion;
por purigi la motivojn de mia konduto;
por konformigi min al tiu humileco
kiun neniu provoko povas ĝeni;
al tiu pacienco kiun neniu sufero
povas superforti;
al tiu integreco kiun neniu profitemo
povas skui;
por ke mi havu la kapablon servi Vin,
kaj instrui Vian Vorton.

Baha'i Prayer

Sendita de Mary Whiting

Alfabeto.

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh,
Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo,
Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz

*Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff,
Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ,
Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr,
Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz.*

Nomoj de la literoj: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo,
ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to,
u, ŭo, vo, zo.

La problemo do jam en 1905 estis solvita, kaj nur restas al la Esperantistoj lerni kaj uzi la "netuŝeblan" skribmanieron.

Kaj ankoraŭ pri la supersignitaj literoj. Lastatempe la disko de D-ro Mario Pei milde kritikis denove la uzadon de supersignoj en Esperanto. Ĉi tie mi ne detale defendos la supersignojn — kvankam mi certigas, ke ili estas nepre defendindaj — sed nur atentigas, ke la Fundamento donas al ni alternativon por la okazo, kiam supersignitaj literoj estas nedisponeblaj. Sur la paĝo 3a de la Fundamento, ĝuste sub la tabelo de ia literoj kaj ties prononco, ni legas: **La presejoj, al kiuj mankas la literoj ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas uzi anstataŭ ilin ch, gh, hh, ĵh, sh, u.**

Ni memoru, ke siatempe Zamenhof ne multe pensis pri skribmaŝinoj kaj radiotelegrafo, sed unue pensadis tiam pri la presarto, al kiu li do difinis la rajton uzi anstataŭajn formojn. Certe kun la disvolvigo de la tekniko tiu

alternativa literumado, estu egale valida en kiu ajn okazo, kiam supersigno estas bezonata sed ne disponebla. Sed mi ofte spertis, menciante tiun fakton ekzemple en kunligo kun la nuntempaj diskutoj pri starigo de Esperanta morsa kodo, ke oni traktas la ideon, kvazaŭ mi proponus ion novan, tute projektan!

Fakte mi ofte scivolos, kial oni tiel vigle — eĉ mi dirus obstine — evitadas ĉian uzon de **ch, k.c.** Preskaŭ senescepte la Esperantistoj (inkluzive de mi mem!), skribante leteron per supersigna maŝino, trairas ĝin poste per plumo por aldoni la "hokojn" kaj "ĉapelojn"! Kial? Kaj: donante al presisto, kiu ne disponas pri Esperantaj litertipoj, mallongan tekston en nia lingvo, ni zorge reverkas la tekston por eviti supersignendajn vortojn. Sensesence!

Efektive la formoj **ch, gh, hh**, k.t.p. aspektas strange al ni, sed nur ĉar ni ne al kutimiĝis al ili. Cetere,

la nia ne estas la sola lingvo kun supersignoj, kiuj foje-foje mankas: germana presisto, ne disponante pri ŭ, tute trankvile presas **ue**, k.c. Dana radiisto, ne volante sendi **ŝ**, sengene anstataŭas ĝin per **aa**; ktp. ktp.

Krom ĝia nura utileco, ni havas alian motivon por enpraktikigi **ch**, **gh**, ktp. Preskaŭ ĉiu el la trovolontaj "reformantoj" de Esperanto eklaboras ĝuste ĉe la alfabeto. Kiel facile oni komencas: ni uzu **y** por **j**, tiel eblos uzi **j** por **ĵ**. Bonege! Tiel kuraĝigite ni daŭrigu: **ts** por **c**, sekve **c** por **ĉ**. Bravege! Sed nun la vojo fariĝas ne tiel glata kaj fine en-trudiĝas **x**, **w**, **q**, kaj nur Dio scias kion ceteran.

Nur pensu, ke se la Esperantistoj ne volas "solvi" la supersignan demandon per la laŭfundamenta, paralela uzo de **h**, iam iu instanco de lingvaj spertuloj eble trudos al ni reformitan alfabeton. Laŭ mia ŝato, mi multe preferus legi frazon, kiel "Mi ne scias chu shi ghuis la shinkopecon je jhaudo" ol "Mi ne stias qu xi djuis la xinkopetson ye jawdo" aŭ simile.


Chu ne ankau vi?

NIAJ GRUPOJ KAJ ILIA AGADO

El Norda Kalifornio: du lernejinstruistoj, Martha Toscano kaj Lavina Parsons, por akiri sian magistran diplomon ĉe S. F. State Teachers' College, pritraktadas esperanton.

Esperanta ekspozicio okazis la 27an de aprilo en la Open Home Adult School, Sequoia High, Redwood City, kun granda sukceso.

El Pitsburgo, Pensilvanio: Esperanta klubo nun estas realaĵo. Pli ol 300 personoj partoprenis kursojn en multaj partoj de la urbo, inter alie sub la aŭspicioj de la universitato, vesperlernejoj, kaj kristanasocioj. La pitsburga klubo estas la nukleo de esperanta agado en la Tri-Stata Regiono (Ohio, Pensilvanio, Virginio). Membroj de la klubo partoprenos la kongreson de ELNA en Chicago, kaj kelkajn oni renkontos en Kopenhago.



Patro Sigmund

PATRO SIGMUND TRAVOJAĜAS NORDAN AMERIKON

Patro Sigmund naskiĝis dum la unua mondmilito, en Rusio. Post la fondiĝo de la Pola Respubliko, lia familio transiris tien, kaj tie li edukiĝis. En 1933 li iĝis kapucena monako. Antaŭ lia ordinacio, lin enkarcerigis la nazioj, unue ĉe Sachsenhausen, poste ĉe Dachau. Li liberiĝis la 29an de aprilo, 1945.

Ĉe Dachau, Patro Sigmund sukcesis establi sekretan esperantan grupon, kun membroj el 13 landoj. Por protekti sin, ili laboris nur triope.

Post sia liberiĝo, li studis historion modernan kaj eklezian ĉe Louvain, Belgio. Li doktoriĝis en la Universitato Gregora (Romo, 1951), verkinte tezon pri Modernaj Formoj de la Religia Vivo. Post sia ordinacio, Patro Sigmund dediĉis sin al la servo de polaj kaj italaj enmigrintoj en Aŭstralio, kie li ankaŭ instruis moralteologion, historion de la eklezio, arton, kaj sociologion. Lia ĉefa tasko nun estas labori kun tiuj enmigrintoj en la kadro de la paroko.

Patro Sigmund nun travojaĝas Usonon, vizitonte Polion la unuan fojon post 23 jaroj. Li oficiale reprezentos la Aŭstralian Esperanto-Asocion ĉe la kongreso de ELNA en Chicago.

THE STONE IN THE ROAD

LA ŜTONO EN LA VOJO

A simple tale for beginning readers
in Esperanto.

Near a village there lived a rich man. He had a fine house of many rooms filled with beautiful things. The rich man's house stood beside the road. Every day a great many people traveled along the road to and from the village. The rich man liked to watch the people as they passed by. When he saw the people he was sad because he saw so many lazy ones.

"I wonder whether everybody is lazy?" thought the rich man. And he tried to think of a plan to find a person who was not afraid to work. He thought and thought and by and by he had an idea. He fetched a stone and put it in the middle of the road. Then he went into his house and sat down by the window to see what would happen. The first person who went by was a man taking his cow to sell at the market in the village. When he saw the big stone in the way, he frowned.

"Why should that great stone be there in the middle of the road for a poor man to stumble over?" he grumbled. "The man who lives in that fine house is rich. Why doesn't he have his servants take the stone away?" The man with the cow murmured and grumbled, but he did not try to move the stone. He was too lazy. He walked around it pulling his cow behind him, and went on his way to the village.

The next person who passed by was a farmer carrying his corn to the mill to be ground. When he saw the stone in the middle of the road he began to grumble too. "Why should that great stone block the way?" he grumbled. "If I were as rich as that man who lives in that fine house, I would order my servants to take it away." But the farmer did not try to move the stone.

Simpla rakonto por personoj
komencantaj legi Esperanton.

Proksime al vilaĝo loĝis riĉulo. Li havis belan domegon kun multaj ĉambroj plenaj de belaj posedaĵoj. La domo de la riĉulo staris apud la vojo. Ĉiutage multaj homoj vojaĝis laŭ la vojo tien kaj reen de la vilaĝo. La riĉulo ŝatis observi la homojn kiam ili preterpasis. Kiam li observis la homojn, li estis malĝoja ĉar li vidis tiom da mallaboremuloj.

"Mi scivolas ĉu ĉiu estas mallaborema," pensis la riĉulo. Kaj li penis fari planon trovi homon kiu ne timas labori. Li pensis kaj pensis kaj poste li havis ideon. Li alportis ŝtonegon kaj ĝin metis en la mezon de la vojo. Poste li eniris la domon kaj sidigis apud la fenestro por vidi kio okazos. La unua persono kiu preterpasis estis viro kondukanta sian bovinon por vendi ĝin al la vendejo en la vilaĝo. Kiam li vidis la ŝtonegon en la vojo, li malridetis.

"Kial estu tiu ŝtonego en mezo de la vojo por malriĉulon faligi?" li grumblis. "La homo kiu loĝas en ĉi tiu domego estas riĉa. Kial li ne devigas siajn servantojn ĝin forpreni?" La homo kun bovino murmuris kaj grumblis, sed li ne penis movi la ŝtonon. Li estis tro mallaborema. Li ĉirkaŭmarŝis la ŝtonegon tirante la bovinon post si, kaj iris survoje al la vilaĝo.

La sekvanta persono kiu preterpasis estis farmisto portanta sian maizon al muelejo por ĝin mueligi. Kiam li vidis la ŝtonegon en mezo de la vojo li komencis grumbli ankau. "Kial tiu ŝtonego bloku la vojon?" li grumblis. "Se mi estus tiel riĉa kiel tiu homo kiu loĝas en tiu ĉi domego, mi ordonus miajn servantojn ĝin elporti." Sed la farmisto ne penis movi la ŝtonon. Li estis tro mal-

He was too lazy. He drove around it, and went on his way muttering and grumbling.

All day long, people travelling along the road came to the stone and grumbled about its being in the way. But none tried to move it. They were all too lazy. By and by, toward night, the miller's boy came whistling along the road. He had worked hard all day long at the mill and he was very tired. He came to the stone and stopped. "It will soon be dark," he said to himself. "Someone is sure to fall over this big stone and be hurt. I must move it before it grows darker."

He took hold of the stone with both hands. It was very, very heavy and he could move it only a little way at a time. And he was very tired from his long day of hard work at the mill. But he tugged and pulled with all his might until at last he had rolled the stone out of the road. "Now," said the miller's boy, "the stone can do no harm."

He put his hands in his pockets and was just starting home, when he looked down at the place where the stone had been. There lay a big pot. It had been hidden by the stone. The miller's boy lifted the cover off the pot. Then his eyes grew as big as saucers. The pot was filled with shining gold pieces! There was something written on the side of the pot. The miller's boy bent down and spelled it out.

He read, "This pot and the gold belong to the one who takes away the stone."

"Why," said the miller's boy. "That surely must mean me." And he went off, dragging the heavy pot behind him, thinking how surprised and happy the folks at home would be over his good fortune. The rich man watching from his window was happy too. At last he had found someone who was not afraid to work.

laborema. Li ĉirkaŭveturis ĝin kaj iris survoje murmurante kaj grumblante.

Tutan tagon homoj veturante laŭ la vojo venis al la ŝtono kaj grumblis pri ĝi tie en la vojo. Sed neniu penis ĝin formovi. Ili estis tute tro mallaboremaj. Poste, ĉirkaŭ nokto, la knabo de muelisto venis fajfante laŭ la vojo. Li jam laboradis forte la tutan tagon ĉe la muelejo kaj li estis tre laca. Li venis al la ŝtonego kaj haltis. "Estos baldaŭ mallume," li diris al si, "iu nepre falos pro ĉi tiu ŝtonego kaj sin vundos. Mi devas ĝin movi antaŭ ol fariĝos pli mal-lume."

Li ektenis la ŝtonegon per ambaŭ manoj. Ĝi estis tre, tre peza kaj li povis ĝin movi nur malgrandan distancon dum unu fojo. Kaj li estis tre laca pro sia longa tago da mal-facila laboro ĉe la muelejo. Sed li tiris kaj tiregis per ĉiuj fortoj, ĝis fine li estis rulinta la ŝtonegon el la vojo. "Nun," diris la knabo de muelisto, "la ŝtono ne povas vundi iun."

Li metis la manojn en la poŝojn kaj estis ironta hejmen, kiam li vidis malsupre la lokon kie la ŝtonego estis starinta. Jen granda poto. Ĝi estis kaŝita per la ŝtono. La knabo de muelisto delevis la kovrilon de la poto. Poste liaj okuloj fariĝis tiel grandaj kiel teleretoj. La poto estis plena de brilantaj oraj pecoj! Estis io skribita sur la flanko de la poto. La knabo de muelisto klinis sin kaj ĝin literumis.

Li legis: "Ĉi tiu poto kaj la oro apartenas al tiu kiu forportos la ŝtonon."

"Nu," diris la knabo de muelisto, "Tio certe devas celi min." Kaj li ekiris, trenante la pezan poton mal-antaŭ si, pensante pri kiel surprizitaj kaj feliĉaj la familianoj hejme estos pro lia fortuno. La riĉulo, observante de sia fenestro, estis feliĉa ankaŭ. Fine li estis trovinta iun kiu ne timas labori.

★

★

★

★

★

★



Krom la grandformataj libroj de Stafeto, tiu tre energia eldonejo publikigas de tempo al tempo malpli grandajn kajerojn en serio "Beletraj Kajeroj". Gis nun aperis dek titoloj, plejparte poeziaj verkoj originalaj.

Kvankam la arto en ĉi tiuj volumetoj estas tenata je tre alta nivelo, tio ne signifas, ke ili estas "super la kapo" de la ordinara Esperantisto. Tute kontraŭe! Jen ekzemple unu libro, kiu jam fariĝis unu el miaj propraj plej favorataj, kiun mi legis kaj relegis kun tia ĝuo, kian oni rezervas por nur kelkaj tre okazaj verkoj: **Nur Tri Kolorojn**, de Eli Urbanova, estas vera perlo. La aŭtorino scias manipuli la lingvon kiel malmultaj poeziemaj Esperantistoj estantaj aŭ estintaj. Siaj poemoj fluas, facilege legiĝas, ili kantas kaj ravas — jen kia devas esti la poezio. Cetere, post la legado, oni kredas koni la poetinon kiel tre bonan kaj longatempan amikininon.

Ion alie la **Junaga Verkaro** de Edmond Privat efikas nostalgie sed ankaŭ instrue pri la unuaj, "primitivaj" tagoj de la lingvo. Jam tiam Esperanto pruviĝis aparte bona ilo por la poezio, sed ne tiel evoluis ankoraŭ. Privat havis simplan, lirikan stilon tiam. La libro montras tiun stilon en liaj junagaj poemoj, noveloj, kaj eĉ unu teatraĵo, kiuj konsistigas la libron kune kun kelkaj artikoloj aŭ, pli ĝuste, lekcioj.

En **Reĥoj** ni legas la poemojn de 19 jugoslavaj poetoj. La tono estas ankoraŭ alia: pli evoluinta, pli malhela en tono, pli melankolie grizaj, sed ie-tie certe tre bela. Ni komparu ekzemple la de Milivoje Pavloviĉ "Elegio" kun la de Privat "Lasta Kiso":

NOVAJ LIBROJ

Elegio

Kial vi, vento, triste blovas,
Kvazaŭ malsanus via kor'?
—Mi ploras pri la floroj, kiuj
Min karesadis per odor'.

Kial nun ŝvebas, ho rivero,
Melankolio super vi?
—Iaman verdon mi priploras.
Tra kiu gaje fluis mi.

Kial, ho kial, vi birdeto,
Pepas la kanton de dolor'?
—Tiujn printempojn mi priporas,
Kiuj de l' tero flugis for.

Kial en vi, amara koro,
Malĝojo kreskas kaj sufer'?
—Mi ploras, ĉar de mi forkuris
Feliĉo, Amo kaj Esper'.

Lasta Kiso

Vi kien flugas, papilio,
Tremante kaj rapide?
Jam mortis rozo kaj lilio
Kaj venas frost' perfide.

Flugiloj viaj kvazaŭ lampo
Briletas en nebulo,
Vi kion serĉas tra la kampo,
Perdita somerulo?

Dezertaj estas la ĝardenoj,
Kie vagis amo via.
Skeletoj ŝajnas la vervenoj
Sub kverko senfolia.

Vi kial flugas en malvarmo
Tra flora la tombejo?
Sur ĉiu loko pluva larmo
Nun restas en herbejo.

Silentas ĉiuj en la nestoj
Kaj svenis bonodoroj.
Jam ne batalos vi kun vespoj
Pri la floretaj koroj.

Jen restas nur en kampo vasta
Velkinta krizantemo,
Sur kiu kiso via lasta
Mortigos vin en tremo.



Aliaj eldonoj en la serio "Beletraj Kajeroj": Nova Ezopo, de Stefo Urban, kolekto da originalaj mallongaj kaj distraj poemoj kun Ezop-ecaj instruoj, el kiuj jam plurfoje citiĝis unu juvelo, kiu donos ideon pri la speco de libro:

"Eĉ guto malgranda
Konstante frapante . . ."
(Progresas, ho Dio!—tro
lante!)

Kelkaj aliaj titoloj en la serio estu rezervataj por komento je alia fojo.

La "kajeroj" kostas inter \$1 kaj \$1.50, do ne estas multekostaj. Paren-teze, ni lernas per artikolo en "Es-peranto" ke la libroj de Stafeto estas kompostataj por presado **permane**, do ne nur la literatura kvalito de la en-havo sed ankaŭ ĝia tipografia kvalito estas vere aparta.

Ankaŭ paren-teze: Stafeto pretigas por publikigo en la kajera serio **La Profeto**, de Kahlil Gibran, en traduko de ELNA-anino Roan Orloff Stone.

MALONGAJ NOTOJ

Roy kaj Dorothy Holland, niaj alte estimataj kaj tre aktivaj kunlabor-antoj, havas novan adreson: 1702 Rockwood Trail, Fayetteville, Ar-kansas. Legantoj eble deziros aldoni ĉi tiun fakton al la malgranda bio-grafo aperinta sur p. 46 de la mart-aprila numero.

Heroldo de Esperanto reprenis, en sia numero 1336 (1a de aprilo, 1962) la artikolon "Problemoj pri Varbado" de F. R. Banham, kiu aperis en nia januara numero. En siaj numeroj 1337 kaj 1338 (16 aprilo, 1 majo) **Heroldo** ankaŭ aperigis kompletigitan formon de la listo de Esperanto-

stratoj aperinta en nia januara kaj marta numeroj. Jen la kompletigaj informoj por nia listo: Aŭstrio—Wiener Neustadt (Esperanto-parko) 30 julio 1958; Brazilo—Macaé, ŝtato Rio de Janeiro (Zamenhof-strato) 9/25/17 (anstataŭ en Juiz de Fora); Monte Santo de Minas (Esperanto-placo) 1960; Muritiba, ŝtato Bahia (Zamenhof-strato) 8/8/60; (mankas nia listigo de Macau); Natal, ŝtato Rio Grande do Norte (informoj kiel por Macau en nia listo); Resende, ŝtato Rio de Janeiro (Esperanto-placo) 12/17/61; Santo Amaro, ŝtato Bahia (Esperanto-strato) 12/30/59; Finnlando—Espoo (Esperanto-strato) 1955; Irislahti (Esperanto-vojo) 1956; Franclando—Le Havre; Le Mans (Zamenhof-strato); Privas/Ardèche (Esperanto-strato); Itallando—Citta-della (Esperanto-strato) 3/18/62; Fidenza; Modena; Piacenza; Ragusa (dato: 1959); Rome (Esperanto-strato) 4/16/59; Torino (Zamenhof-gardeno) 9/61; Voghera; Izraelo—Hercelija (Zamenhof-strato) 1961; Jerusalemo (Zamenhof-strato); Jugoslavio—Slavonski Brod (Esperanto-strato) 12/16/61; Kanariaj Insuloj—La Laguna de Tenerife (Zamenhof-strato) 12/61; Libano—Bejrut (Esperanto-strato) 1960; Litovio—Kazlu Ruda (Esperanto-strato) 5/12/60; Nederlando—Dordrecht (Zamenhof-alco) 1/27/61; Polio—Bytom (Zamenhof-strato) 1959; entute, 221 urboj, 239 stratoj. Nia membro A. Holzhaus preparis la listojn.

Ni ankaŭ menciuj ke **Heroldo** havas novan redaktoron, ek de la fino de 1961. Ni gratulas ŝin pro ŝia tre bona laborado.

Havindaj verketoj en Esperanto konstante aperadas, kaj estas ofte senpagaj. Cifoje ni mencias: "Ekskurso en Nombroj" (14p.) de The Duodecimal Society of America, 20 Carlton Place, Staten Island 4, N.Y. La sekretario de tiu societo estas fidela membro de ELNA: Ralph H. Beard. Kaj helpis prepari la tradukon la sekretario de ELNA.—Wiendenbuck, 1000-jährige Stadt an der Ems, de Hubert Daum, Kolping-str. 15, Wiendenbruck 1, Orienta Germanio.—Bonn, de Ernst Kind, Nordstr. 97, Bonn, Germanio.—Como

kaj Gia Lago, de Azienda Autonoma Soggiorno di Como, Como, Italio. — Wuppertal, de Presse- und Werbamt Wuppertal, Wuppertal, Germanio. — Almanaketo, de Esperanto-rondeto ĉe Kleriga Domo, Martin, Ĉekoslovakio. — Frato Arni Decorte, La Patro de la Lepruloj, (por ĉi tiu broŝuro sendu du internaciajn respondkuponojn), de Fratoj de l' Karitato, Instituto Sankta Kamilo, Bierbeek, Belgio. — Ankaŭ havinda estas faldfolio esperanta de la Malmo Turisttrafikforening, Malmo, Svedio. — Eceptante la verketon pri Decorte, ĉiuj estas senpagaj.

George Wagner, nia konata membro, estis la temo de longa, tutkolona artikolo en la Tampa Times de la 24a de marto. La artikolo, verkita de Polly Henry, inkludis lian bildon.

• Aliaj menciindaj gazetartikoloj: en la februara numero de **United Church Observer**, de Toronto, tripaĝa raporto verkita de Dorothy Henderson, kun titolo "The World of Esperanto" — en **Design News** de la 21a de marto, tutkolona artikolo de la redaktoro J. P. Dubois pri ELNA-membroj Leif Heilberg, George Falgier, kaj Conrad Fisher. La redaktoro ankoraŭ ne decidis, ĉu subteni Esperanton, sed emfazis la bezonon konsideri ĝin. — ankaŭ menciinda, sed ĉifoje esperantlingva artikolo, estis "Infanoj kaj Esperanto" aperinta en **SAT-Amikaro** por marto. La artikolo inkludas konsilojn al esperantistaj gepatroj pri lernigo de Esperanto al idoj.

Lumbildoj (koloraj fotografaj diapozitivaj) estas kunigitaj en serion, kaj akompananta prelego estas pretigita, en Francio. Nia sekretario Conrad Fisher planas magnetofonigi la prelegon por personoj kiuj preferas paroli la prelegon per sonbendo. La prezo de la serio de 48 diapozitivaj, kun la teksto, estas dek dolaroj, Se vi deziras aĉeti la serion por uzo en via regiono, indiku tion al Conrad Fisher per poŝtkarto. Ne sendu monon, vi povos pagi kiam viaj diapozitivaj estos pretigitaj. La serio estas speciale valora por diskonigi Esperanton. Se vi ne volas aĉeti la serion, sed preferas lui ĝin, ĝi estas luebla kaj la luprezco estas

kvin dolaroj. Ĉiu ŝtato devus havi almenaŭ unu ekzempleron de la serio por utiligo en la grupoj kaj ekspozicioj en tiu ŝtato.

Mimeografita raporto pri la prelegvojaĝo de Joŝiko Kajino (unua parto) aperis en aprilo.

Jen malgranda resumo pri la vojaĝo 28 januaro — 8 aprilo: **Napa** — ĝis la 10a de februaro, okazis 10 prelegoj antaŭ proksimume 1,200 personoj. Du ĵurnaloj favore raportis — kaj, komenĉiĝis nova kurso kun pli ol 30 lernantoj (instruisto: Martha Walker); **San Mateo kaj Hillsborough** — la 17an de februaro okazis festo kun la Norda Kalifornia Esperanto-Asocio ĉe la Lawrence School, ĉeestis 200 esperantistoj kaj gepatroj. 8 aliaj prelegoj (kune sume proks. 1,500 ĉeestantoj) okazis, i.a. ĉe la Budha Templo. Tipa programo (daŭranta 1½ horojn): salut-vortoj kaj anekdotoj, koloraj lumbildoj (kun angla traduko) pri japana vivado, popol-dancoj, prelego pri la lingva problemo en Japanio, demandoj kaj respondoj, 16mm-kolorfilmo pri japana industrio, kaj finaj anoncoj pri Esperanto-kursoj kaj -kunvenoj. Joŝiko parolas nur en Esperanto, iu alia tradukas anglan. **San Francisco** — du radio-intervjuoj (la 15an kaj 19an de feb.). **San Diego kaj La Jolla** — prelegoj antaŭ la esperanta societo, kaj antaŭ 500 lernantoj en la gimnazio; tradukis nia konata samideano D-ro Lewin, kiu ankaŭ aranĝis prelegon en la Scripps Instituto, antaŭ 80 sciencistoj. **Los Angeles** — dusemajna vizito, 8 prelegoj, ĵurnalartikoloj i.a. en la Herald American, kaj la Times. **Arcata kaj Eureka** — 6 prelegoj antaŭ 1,500 personoj. **Portland, Canby, kc.** — 11 prelegoj. Ensume, la orienta parto de la vojaĝo inkludis 46 prelegojn antaŭ proksimume 6,500 personoj. Ni gratulas, kaj esperas ke ankoraŭ pli da sukcesoj sekvos. Se vi deziras organizi prelego(j)n en via regiono, kontaktu la sekretarion de ELNA, Conrad Fisher.

Raportu la progreson en VIA urbo!



La **Esperanto Review** presas senpage mallongajn korespondanoncojn de esperantistoj.

Ĉekoslovakio:

- Bohouš Maly, Horice v Podkrkonosi — IV.r. — SZTS.
 Ladislav Spina, Liberec V, Kraluv haj 358.
 Klement Krebs, Tr. Budovatelu 93-22, Most 6.
 Seidler Zdenek, P. Kyjovice-Opavsko, Teskovice 70.
 Fr. Slavik, Praha 6 — Bubeneč, Puskinovo nam 9.
 D. Svozilek, Kyjov (Morava), Mezi Mlaty 300.
 Oldrich Krejcirik, Brno, Anenska 10.

La sekvantaj personoj estas ĉiuj same adreseblaj:
 Uzina Esperantista Rondeto.
 ZVVZ Liberec — Vesec.

- Jana Holanova (25jara oficistino; pri muziknotoj)
 Milena Krelinova (28jara oficistino)
 Jarmila Jirova (27jara oficistino)
 Ingrid Lenzova (23jara konstruktore; interesigas pri ilustritaj poŝtkartoj)
 Dana Vydrova (32jara oficistino (pri filmoj kaj teatro)
 Jiri Bartos (28jara konstrukturo; pri geografio kaj ŝipsporto)
 Zdenek Dvorak (40jara konstrukturo)

- Zdenek Fejfar (31jara konstruktore; pri loĝekulturo)
 Frantisek Gamisch (52jara laboristo; interesigas pri poŝtmarkoj)
 Frantisek Holecek (37jara konstruktore)
 Zdenek Holub (37jara konstruktore; pri kabaredoj; estradoj)
 Frantisek Koblizek (40jara oficisto; pri fotoj)
 Teo Novotny (59jara magazenisto)
 Josef Posmura (52jara laboristo; pri fruktoj kaj floroj).

Hungario:

- 20 gekursanoj, komencantoj, deziras korespondi bildkarte.
 Adreso: Esperanto Kurso, 2 es Bêke Szallo, Miskolc - Percecs, Marton tér 9.

Pollando:

- F-ino Slava Laczhiewicz, ulica Granitowa nr 8 m 4, Lodz 7 (17jara)
 Piduch Jozef, Powiat Zielona Gora, Ochla 99. (Pri poŝtmarkoj)
 Waldemar Kisiel, Olsztyn, Kortowa bl. 21. (Pri poŝtmarkoj)

Romanio:

- Bacila M. Aurel, Caransebes, Str. Tiglanici Nr. 8a

USSR:

- V. I. Peŝikov, Tashkent 13, ul Sota-Rustaveli domo 59 kv. 19 (pri poŝtmarkoj).

ALDONO

Bonvolu aldoni al la listo de solvintoj de la enigmo en la januara numero, jam aperinta en majo, la nomon de B. Angelkov, V. Buĉinprohod, Sofijsko, Bulgario, kies gusta respondo atingis nin tro malfrue por mencio antaŭ nun.

Write for Free Book List

Esperanto League Book Service
 Middleton, Wisconsin

ESPERANTO IN THE SCHOOLS

A letter from the Department of Education, State of California, dated April 27, 1962, directed to Catherine Schulze has been sent on to the **Review** as being of general interest to those who are taking part in the campaign to introduce Esperanto into the schools of our country. The text of the letter follows:

Dear Mrs. Schulze:

Once every three months the Bureau of Elementary Education is asked to make a report for the Governor's Council. This report goes to administrative officers and the Governor's staff.

When I returned from the meeting of the Northern California Esperanto Association, I reported the activities of the group to Miss Heffernan. She suggested that I submit a part of this report to the Governor's Council. Attached you will find a copy of the materials which were forwarded for the report. It occurred to me that you might be interested in this extension of information regarding current programs in Esperanto.

(signed) Mrs. Afton Dill Nance,
Consultant in Elementary
Education.

Report on Esperanto in Elementary Schools:

A member of the staff participated in a Conference of the Northern Calif. Esperanto Association which was held on Feb. 17, 1962, in San Mateo. During the last few years the increased interest in the study of foreign language in the elementary schools has led to the establishment of classes in Esperanto for children. In the past, instruction has been given to adults, and it is reported that every country in the world has a group of citizens who speak this common language. Esperanto can be mastered by most persons after three months of intensive instruction.

Classes in Esperanto for children



Two New Esperantists

Pictured above are two of our newest Esperantists, Mary Wolverton (age 84), and her daughter, Betty Wolverton. They recently finished an elementary course, after having to drive 20 miles to class twice each week. Betty Wolverton will be teaching a course in San Jose, California, in the fall.

are often given in connection with programs of international education and the children correspond in Esperanto with girls and boys of other countries.

In some European countries a year of instruction in Esperanto precedes the study of another language. Research carried on in Sweden indicates that children who had studied one year of Esperanto before receiving instruction in German achieved at a higher level when that language was introduced than did girls and boys who had not had the experience in Esperanto. (Ed. note: the experiment referred to was actually in Somero, Finland.)

The development of future programs in this field will be studied with interest by Staff of the Bureau.

(end of letter)

To be added to the list of California schools now teaching Esperanto are the Meadow Heights School in San Mateo (2nd grade, taught by Miss Leta Pendleton), and the Lewis School in Santa Rosa (4th grade, taught by Mrs. Martha Toscano).

LETTERS TO THE EDITOR

Esperanto Gets An Endorsement

The vast majority of thinking, educated people believe that we will have some form of world government before the end of this present century. One of the things which would make the transition from the national state to that of world government easier would be the adoption of an international language.

This international language would not replace the existing tongues but would be the second language of everyone.

The question remains, what language? No purely national language could be adopted without offending someone.

However, there is a language which exists outside the limits of nationality and race, and is suitable to the needs of modern living. This language is Esperanto. According to the "World Almanac," at least 1,000,000 people throughout the world speak it. Esperanto is simple, flexible, and easily learned.—Edward F. Lacy III, 6810 Keller, Houston.

The letter reprinted above is from the **Houston Chronicle**. It illustrates how a letter may be short, yet effective. A few, striking points may be more impressive than a long column of argumentation.

Brigitte Santos

HALO! HALO! PAROLAS AL VI KOLONELO GLEN, EL LA ASTRONAŬTIKA FUZRAKETO "MERCURY"

La sekvanta rakonto aperis originale en **Grajnoj en Vento** de la 14 de marto, 1962. La aŭtoro estas 11½-jara knabino. Ŝi verkis la rakonton dum la tago de la fama flugo de Kolonelo Glenn. La rakonto estas gramatike korektita kelkloke.)

En tiu ĉi momento, vestita per speciala ekipaĵo, mi estas en la fuzraketo, kiu kondukos min kvarfoje ĉirkaŭ la Terglobon. Tiu penso, ke mi ĉirkaŭirados la Teron kaj poste plonĝos en la maron, igas bati mian koron.

El aparato interne de la raketo abrupte aŭdiĝas voĉo:

"Kolonelo Glenn! ĉu vi estas preta? Atentu! ni komencas la inversan kalkuladon: -6! -5! -4! -3! -2! -1! 0!"

Mi fermas la okulojn . . . mi aŭdas inferan bruegon . . . Timigan ekpuŝon! . . . Zum! Zum! mi ekflugas!

Ju pli mi supreniras, des pli malgranda aspektas al mi la Tero. Ĝi havas kuriozajn kolorojn, tre malhelajn verdajn kaj blujn nuancojn. Kia beleco! Neniam mi pensis, kiam mi estis malgranda, ke iam mi—kolonelo Glenn, mi faros vojaĝon per raketo!

Mi komuniku kun la Tero . . . !

Mi manipulas ŝaltilon:

"Halo! Halo! Parolas kolonelo Glenn! Ĉu vi aŭdas min? Enrakete ĉio estas en ordo! Mi ne malsatas. Mi nur manĝis bananon, por ke mi havu ion en la stomako.

"Halo! Halo! Ĉu vi, mia edzino? Parolas John! Ĉu vi aŭdas min, karulino?"

"Jes, jes! kiel vi fartas?"

"Tre bone! kaj vi? kaj nia malgranda Duglas?"

“Ni ĉiuj fartas tre bone, dankon!
Revenu tre baldaŭ!”

“Jes! ĝis la revido! mi kisas vin
ĉiujn tre forte!”

Parolante, mi jam ĉirkaŭflugas tri-
foje la Teron. Unu ĉirkaŭiro restas
farota.

Ĉu vi bone imagas? Mi raketflugas
je rapideco de 28000 kilometroj ĉiu-
hore!

Baldaŭ mi devos plonĝi. Nun la
kapitano telefonas de la Tero:

“Halo! Kolonelo Glenn! Nun vi
devas prepari la surmarigadon! Estu
sentima!”


Mi restas tre trankvila, malgraŭ la
terura skuo.

Sub la akvo, de la fenestro de mia
kapsula “Mercury”, mi vidas la fiŝojn
kaj la algojn. Sed la kapsulo re-
supreniras kiel korko, kaj la homoj
sur la ŝipo hisas la kapsulon per
argano.

Tuj multaj kuracistoj alvenas kaj
ekzamenas min. Ili trovas min bon-
sana.

Sed nun mi devas ripozi antaŭ ol
fari novan rondvojaĝon ĉirkaŭ la
Terglobon.

Kiu scias . . . eble iam mi povos
raketflugi al la luno?



Laŭ desegnaĵo farita de Jacques Dubois, 10½ jara knabo.

LA NEĜBULO

La arbedo vekigis kaj trovis kun surprizo, ke la nokto kovris ĝin per mola blanka tapiŝo el neĝo. Ĉiuj devis aktivi pli ol kutime tiun matenon. La neĝo kunportis ne malmulte da kromaj farotaĵoj, — kaj la tempo estis jam tro malabunda matene. Estis ja dolĉe tiri la lanugan kusenegon ĝismentone kaj resti ankoraŭ iomete en la lito, resti en la lito la dek minutojn, kiujn oni intencis uzi por io.

Estas dolĉe tiri la lanugan kusenegon ĝismentone, kaj vere senti, ke oni dormas, konscii, ke oni dormas — sed post heroa decido oni ĵetas la kusenegon flanken — kaj la nova tago estas realaĵo. Tiam oni ekvidas, ke multe da neĝo falis dum la nokto.

Vigliĝas ĉiudome. Oni devas balai ŝtuparojn, oni devas fari irvojetojn al hejtlignejoj kaj al necesejoj, sed kie estas la neĝoŝvelo — kien oni metis ĝin pasintjare? Kaj kie estas la balailo kiu ankoraŭ hieraŭ vespere staris en la ilarejo sub la ŝtuparo?

En la tuta urbeto regis vigla tempomanko, kaj multaj rapidegis al la laborejo tiun matenon. Cetere oni povis iri nur pene, ĉar la neĝo atingis ĝis la genuoj, kaj kie la vento amasigis la neĝon, estis preskaŭ neeble travadi. Sed oni ja devis travadi.

Rektoro Tander aperis en la lernejo vestita per gabardina pantalonon kaj krurvindaĵoj. Kaj tio estis tre komika. Ĉar rektoro Tander estis solena sinjoro, kiu alte taksis sian dignon. Rektoro Tander ne havis longan vojon de sia hejmo al la lernejo, kaj tiun matenon li atendis, ĝis la sonorilo vokis al la unua leciono. Estis ja ankoraŭ mallume, sed por lia digno estus neriparebla damaĝo, se iu el la gelernantoj ekvidus lin trapanetri la neĝamasojn de la strato — vestitan per krurvindaĵoj kaj gabardina pantalonon. Estis pli bone surprizi la klason, veni tri minutojn tro malfrue al la leciono, scii, ke la gelernantoj estas ĉe siaj pupitroj, silente okupitaj de kroma tralegado de la pitagora teoremo — kio certe estas necesa — kaj tiam paŝi en la klason, sur la katedron, kaj scii, ke ĉiuj samtempe ekvidos, ke rektoro Tander hodiaŭ surhavas gabardinan pantalonon kaj krurvindaĵojn.

Rektoro Tander petis la gelernantojn eksidi.

”La pitagora teoremo, Rolf!”

Rolf ekstaris. Ĉiuj aliaj sentis grandan senŝarĝiĝon. Ne estis ŝerco, kiam Kalle ekzamenis. Estis kvazaŭ inkuubo. Kalle estis tirano — iam oni eĉ

NORDA PRISMO

kultura - socia - literatura
ilustrita revuo internacia -
kun kristala valoro



provis bapti lin Nero, sed tio ne daŭris longe. Kalle estis bona, malnova nomo, kiun ĉiu konis.

Rektoro Carl Tander estis tre kontenta pri si mem tiun matenon. Li denove venkis. Li estis la forta, la malvarma, la malmola. Li povis hodiaŭ permesi al si esti ŝercema. Kaj kiam Kalle estis ŝercema, la klaso estis plena de danko pri tio, ke li moŝte komplezis rideti dum la leciono, komplezi, ŝerci, komplezis montri, ke en li malgraŭ ĉio estis malgranda kvanto da homeco, kiun la malvarmo kaj la malmolo ne kovris kaj mortigis.

”Nu, Rolf, la pitagora teoremo”

Rolf tre malbone fartis. Li ruĝiĝis. Li sciis neniu vorton.

”La pitagora teoremo, Rolf? Ĉu ni ne konas la teoremon de la granda filozofo?”

Rolf senesperigis.

”Nu, ĉu ni ne havis tri kromajn minutojn por rigardi la pitagoran teoremon, antaŭ ol la rektoro venis hodiaŭ?”

Rolf ne povis plu elteni la rigardon de la rektoro. Li rigardis la pupitron. Li rigardis tra la fenestro — la neĝo ĉie blanke tentis, kaj tagiĝis jam.

”Ke ni estu tie, Rolf! La pitagoran teoremon ni ne povas lerni, sed rigardi tra la fenestro kaj revii pri neĝviroj kaj amuzo, tion ni povas! Ho vi! Tie ni devus esti, Rolf!”

Kaj rektoro Carl Tander rigardis la klason kun la vizaĝesprimo, kiun ĉiuj tiel bone konis, la vizaĝesprimon, kiu signifis, ke ni ridu pri la amuzaĵo, kiun la rektoro diris. La klaso laŭdeve ridis.

”Sidigu vin, Rolf! Ni scias la rekompencan por prezentado kiel la via. Ni devus nun koncentri nin!”

La leciono malrapide limakis al sia fino. Ne estas kredible, ke 45 minutoj povas esti tiom longaj. Sed fine

sonoris. Estis kvazaŭ liberigo, kiam oni venis sur la lernejan korton.

La ĉevala neĝplugilo preterpasis sur la strato. Kaj la pedelo de la lernejo faris vojeton sur la korto. Dum la tago li devis forigi la neĝon de la korto, sed provizore plej bezoniĝis vojetoj, kie la inspektanta instruisto iru tien kaj reen dum la paŭzo. Feliĉe la lernantoj piedpremis la neĝon dum la antaŭtagmezo, kaj tiel grave faciligis la laboron de la pedelo, ĉar la neĝon li ja ne bezonis forigi. Sed la vojeto devis estis preta. Espereble ”la maljunulo” ne venos sur la korton almenaŭ en la unua paŭzo. Feliĉe ne, ĉar jen Arsell. Neniu danĝero, dum inspektas lektoro Arsell.

Lektoro W. H. Arsell estis la plej populara persono en la lernejo. Li staris momenton sur la ŝtuparo, antaŭ ol li iris sur la korton. Kun la manoj en la surtutaj poŝoj li staris tie, kun petola rideto sur la buŝo, kaj certe iu ŝerca rimarko — la pedelo ŝatus aŭdion, li vidis laŭ la vizaĝoj de la lernantoj, ke lektoro Arsell diris ion amuzan. Certe ion duone ironian! Jen li malsupreniris. La knabaro cedis. Tiel certe la maro ambaŭflanken cedis antaŭ Moses, pensis la pedelo. Kiom da diferenco inter Arsell kaj ”la maljunulo”! Kompreneble la lernantoj flanken cedas ankaŭ antaŭ la maljunulo, alie ili ne kuraĝas. Ili timas la maljunulon. Sed kio valoras, estas, ke la lernantoj ne timas lektoron Arsell — kaj tamen flanken cedas! Kvankam Arsell certe ne koleriĝus, se ili ne estus cedintaj!

Lektoro Arsell haltis kaj babilis kun pedelo — multe da kroma laboro pro tiu neĝo, vi devus igi la ĉevalan neĝplugilon fari viziton ankaŭ sur la lerneja korto! Kaj Arsell daŭrigis, ankoraŭ kun sia petola rideto sur la buŝo.

Neĝbulo siblis tra la aero. Ĝi ne

estis malmola, sed ĝi trafis lektoron Arsell meze sur la brusto. Ĝi lasis blankan makulon sur la nigra surtuto de la lektoro.

Estis malpermesite ĵeti neĝbulojn sur la lerneja korto. Severe malpermesite. La rektoro antaŭ du tagoj severe instrukiis pri tio en ĉiuj klasoj. La lernejo havis la respondecon, se iu estos trafita de neĝbulo en la okulo — aŭ se iu fenestro estos frakasita. La lernejo havos la kulpon.. Estis severe malpermesite ĵeti neĝbulojn.

Jen la rektoro staris malantaŭ sia kurteno, kaj vidis tion, kio okazis sur la korto. Li vidis, ke la neĝbulo estas ĵetata. Li ankaŭ vidis, kiu ĵetis ĝin. Kaj li vidis, ke lektoro Arsell ne povis vidi, kiu estas la pekinto. Rektoro Tander ĝojegis. Li ne ŝatis, ke Arsell estas tiel populara, kaj ke li malgraŭ sia malsevero estas tiel respektata de la lernantoj. Neniam estis pekoj kontraŭ la disciplino en la lecionoj de lektoro Arsell. Ankaŭ ne, kiam li inspektas dum la paŭzoj. Fakte la rektoro sentis, ke tute hazarde tio okazis — estas ja ŝatinda knabo, tiu, kiu ĵetis, knabo, kiun oni dum tri jaroj povis nur laŭdi. Domaĝe, ke ĝuste li hazarde ĵetis tiun neĝbulon. Kvankam — fakte ja estis feliĉa hazardo, ĉar nun lektoro Arsell devos solvi la aferon; lektoro Arsell devos zorgi, ke la knabo ricevu sian punon. Tio ja estas evidenta rompo de la respekto, la reputacio de la lernejo suferas, kiam tia afero okazas. Tiam aferon oni nepre riproĉu. La rektoro ĝojegis. Estos interese vidi, kiel lektoro Arsell reagos al tio, kiel li eltrovos, kiu estas la pekinto.

Lektoro Arsell malrapide turnis sin, la manojn li ankoraŭ havis en la surtutaj poŝoj, kaj li aspektis tre petola. Li rigardis ĉiujn knabojn, kiuj

staris en la neĝamaso, ĝis super la genuoj en neĝo. Unu el la knaboj aspektis tiel kulpa, ke la lektoro rimarkis. Li vokis la knabon, kiu tuj venis al li.

La rektoro de malantaŭ sia kurteno observis la epizodon. Li rimarkis, kiel sagace Arsell tuj trovis la pekinton.

Kiam la knabo venis proksime al Arsell, la lektoro tre malrapide levis la dekstran manon el la poŝo kaj montris al la neĝmakulo sur sia brusto.

”Forigu!” li mallonge diris. La knabo deprenis ganton, kaj forigis la neĝon de la lektora surtuto.

Tio estis ĉio.

Malantaŭ sia kurteno rektoro Tander terure ĉagreniĝis pro la efika riproĉo. La reago de lektoro Arsell certe sentiĝis en la konscio de la knabo multe pli ol kiu ajn ordinara puno. Tiom bone la rektoro konis la lernantojn. Kaj precipe ĉi tiun knabon.

Ĉar lektoro Arsell tiel reagis, ne plu ekzistis iu peko kontraŭ la disciplino. raportenda al la rektoro. Malbenite! Duoble malbenite, ĉar tio estis nova venko por lektoro Arsell; lia aŭtoritato ne estis malfortigita, li perdis neniom da digno, kaj en la okuloj de la rektoro li fariĝis ankoraŭ pli granda psikologo — bedaŭrinde.

Postpaŭze sonoris. La lernantoj rapide vicigis sin sur la korto. Ankaŭ tio rapide funkcias, kiam Arsell inspektas! La lernantoj bruis en la koridoro ekster la pordo de la lektora oficejo — estis nur unu balailo, kaj ĉiuj bezonis ĝin por forigi la neĝon, antaŭ el ili suprenbruis en la ŝtuparoj.

Rektoro Tander prenis siajn librojn kaj iris al la dua leciono. Ve al tiu, kiu nun ne scios respondi!



NOTES AT PRESS TIME

CONGRESS PROGRAM: The Congress Committee announces the following plans: Thursday, July 5, 9:30 AM, a pre-convention tour of the financial district; 7:30 PM, mixer at the Benjamin Franklin room, First Federal Building, at 7 South Dearborn Street. Friday, July 6, 9 AM, opening business meeting followed by two simultaneous meetings of teachers' group and a symposium on how ELNA can help local clubs in their work, and then another joint meeting; 2 PM, business meeting; public meeting in the evening. Saturday, July 7, 9 AM, business meeting; 2 PM, tour of the city or other entertainment; 7 PM, banquet. Sunday, July 8, closing meeting. Remember there are also pre-convention activities beginning July 1, so come early if you can.

NEW PUBLICATIONS: "Esperanto Comments and Commentary" and "One Language for the World, as told by a Canadian who was there" are well-written folders by Dorothy M. Henderson. Both are excellent publicity items, obtainable from Esperanto Press, Oakville, Ont. "Comments" sells for \$4 for 500, and "One Language"--actually a 12-page booklet--sells for 45¢ for 10 or \$4 for 100.

NEWSNOTES: Arthur Brooks Baker, America's pioneer Esperantist, reports on a special class session with 45 gifted fifth and sixth-graders at Lompoc school district, Vandenberg Air Base recently. S-ano Baker alternated Esperanto instruction with stories and demonstrations of science oddities, drawn from his long and colorful experiences, and reports the session an apparent success.... Young Polish Esperantist Marius Dastych writes of his plans to come to the U. S. this fall for a tour of the country and possible studies at the University of Michigan in Ann Arbor. Dastych is an Estrarano of the Pola Esperanto-Junularo, a correspondent for several Polish newspapers, and says he is available for lectures. He plans to bring films or slides with him from Poland. Esperanto clubs in Michigan and Ohio are invited to write him. Address: M. C. Dastych, Kraszewskiego 56/7, Torun, Poland.

WE REGRET to announce the passing on May 18, 1962, of Samideano Arthur C. Ballard of Auburn, Wash., at 85. S-ano Ballard was a member of the Seattle Esperanto Society since 1930 and a member of ELNA. He was an authority on Pacific Northwest Indian lore, and a pioneer of Seattle. S-ano Ballard was born in Auburn, a town founded by his father. An older brother, Capt. William Ballard, helped found the town of Ballard, now a part of Seattle. To his son, Dr. Frances E. Ballard of Reseda, California, who is also a member of ELNA and a staunch Esperantist, and to others of his family, go our condolences.



**ARTHUR
BALLARD**



Universala Esperanto-Asocio

is

The great worldwide organization to promote Esperanto
for people of all nations, all religions, all political beliefs

The *ONLY* North American organization affiliated with UEA is
Esperanto League for North America

Every member of the League is a member of UEA

Why not Join Us Now?

Esperanto League for North America

c/o Jay Berry, Treasurer

3231 N.W. 62nd St., Seattle 7, Washington

Please enter a subscription to the Esperanto Review for me,
membership in the Esperanto League

to start in _____, 196__ . I am enclosing \$2.00 for subscription
\$5.00 for membership

Name: _____

Address: _____



Esperanto Press

Oakville, Ont., Canada

Return and Forwarding Postage Guaranteed